

Citaĵoj el TREZORO

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 91-002-B-1, 1990.12.15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

A.- La pasintan sabaton ni instigis vin akiri la duvoluman antologion pri la **ESPERANTA NOVELARTO** titolita **TREZORO**, kaj ni promesis, ke dum la decembraj elsendoj ni laŭtlege prezentos al vi kelkajn el la prozaj specimenoj, kiujn Reto ROSSETTI kaj Henri VATRÉ submetas al nia legemo. Nian elekton orientas pli teknika problemo, ol nia volo. La mallongeco de niaj radioelsendoj trudas al ni elekton nur el la plej kurtaj rakontoj. Eble vi posedas la verkon **TREZORO**. Tiam vi bonvolu malfermi ĝin je la paĝo 27-a, kie ni trovis treege mallongan specimenon. Temas pri 7-linia humuraĵo de la esperanto-pioniro Pál LENGYEL, kiun ni citu:

Cl.- **Nenia savo**

A.- Arbaristo: ... La urso estas ja la plej danĝera besto. Se ĝi persekutas iun, li devas nepre morti. Se li forkuras, post li kuras ankaŭ la urso; se li rampas sur arbon, post li rampas ankaŭ la urso; se li saltas en akvon kaj penas sin savi naĝante, post li naĝas ankaŭ la urso...

Cl.- Aŭskultanto: Kaj se oni sin kaŝas?

A.- Arbaristo: Tiam kaŝas sin ankaŭ la urso.

Cl.- De Pál LENGYEL, Reto ROSSETTI kaj Henri VATRÉ elektis pli longan specimenon titolitan **La poŝtuko**. Ĝi raportas pri ĵaluza junedzino kaj pri ties videble senkulpa edzo, kiu nenion komprenas el ŝia freneziĝo kaj rifuĝas en ploradon senesperan. Tiu sceno estas bona skeĉo.

A.- Sed kun Julio BAGHY ni okupiĝu pri io pli serioza, pri la **praktika instrumentado** de MIHOK. Imagu la scenon en malgranda ĉambro kun granda silento. Je la paĝo 100 de la libro **TREZORO** vi trovas tiun novelon. La personoj estas:

Cl.- Miĥaelo Mihok

A.- kaj la "tre estimataj, karaj gelernantoj liaj"

Cl.- Mihok: Kara, amata Neĝulino! **Kie estas vi? Kie vi troviĝas? Kie vi trovas sin?**

A.- **Mi estas en la -**

Cl.- Mirinde bone ! **Vi estas en la ĉambro**. Tre bone vi respondis. Mi estas kontenta pri vi. Dankon !... Nu, mia kara ĉarma Mimoso, estu tiel afabla kaj bonvolu diri al mi: **Kiu estas en la ĉambro?**

A.- En la ĉamb-

Cl.- Kolosel Ĉarme vi respondis. **En la ĉambro estas mi** kaj ankaŭ vi, karaj tre estimataj gelernantoj miaj ! Vi estas prava. Vi fariĝos eminenta esperantistino. Mi gratulas al vi... Nun estas via vico... jes... via, mia kara Museto... Museetó!!!

A.- (nacilingve): Kion vi demandis?

Cl.- **Kion ni faras en la ĉambro?**

A.- **Hja!.. Ni ler-**

Cl.- Ĉarme! Tre ĉarme! "**Ni lernas**" Ho vi, mia plej kara, amata Museto, vi tre saĝe respondis: ni lernas. Jes, vere efektive konstateble **ni lernas... Sed kion ni lernas?**... Eksidu, kara mia!... Bonvoiu respondi je tiu ĉi tre interesa kaj grava demando vi... jes vi, aminda Gazelo !... **Kion ni lernas?**

A.- **Es-**

Cl.- Ah! Jen! Vidu! Vi ĉiuj povus imiti ŝin! "**Esperanton!**" Jen la trafa esprimo por nia sankta ideo. En tiu ĉi mallonga respondo troviĝas ho kiom da kaŝitaj pensoj profundaj. Tiu ĉi vorto "**E s p e r a n t o n**" Jen ĝusta respondo, kiu evidente deklaras, ke ni **esperante** lernas **Esperanton**. Tiu ĉi frazo portas en si la Esperon mem, kiu donas forton al niaj sopiro kaj volo. Mirinde bone, vi respondis. Kara, amata Gazelo, vi nepre devas fariĝi fama esperantista verkistino. Ĝuste tiajn adeptojn bezonas nia adorata lingvo. Promesu, ke vi fariĝos verkistino! Bone! Dankon!... Kaj nun ne forgesu ĉiam ekzerci la lingvon tiel, kiel vi faras tion dum miaj kursaj horoj, ĉar la seninterrompa ripetado de frazoj, esprimoj memorfiksas la vortojn kaj instruas nin pri la ĝusta korekta uzado de tiuj ĉefaj elementoj de la lingvo, el kiuj formiĝas la ĉeno de la parolado, la perfekteco de la scio, flueco de la tuj komprenebla klara konversacio. Paroli kaj paroli kaj ĉiam paroli! Jes, karaj tre estimataj gelernantoj miaj, homfratoj de mia koro en la brusto batanta kaj... kaj... gefiloj de mia batanta koro en la samideana brusto... brusto... Karaj gesam- kaj gemalsamcelanoj... nu... Ĉu vi komprenas?

A.- **Ĥoro de Gelernantoj: ĴES!**

Cl.- Mihok (en sia plej alta ekstazo preskaŭ ŝvitante larmojn pro kortuŝiĝo): Jen, jen, jen! Tion mi atendis de vi! Se tiel bone vi progresas, tiam certe, nepre post tri monatoj vi ĉiuj mirinde bele povos paroli la lingvon Zamenhofan, la lingvon, kiun kreis homarano, kiu estas identa je "**interna ideo**" de nia vivanta Esperanto. Nur paroli kaj ekzerci kaj ekzerci kaj paroli kaj vi ĉiuj estos konstatantaj la sukcesplenan rezulton de miaj metodo, sistemo, instrumaniero, esperantiga edukado... Ĝis revido ! Ĝis, ĝis, ĝis, karaj miaj gelernantoj tre estimataj !

A.- **Ĥoro de la Gelernantoj: Ĝis !**

Cl.- Mihok (preterpasante Ĉarmulinon ekhaltas kaj turnas sin al ŝi): Kara mia, ĉu vi scias, kio estas la interna ideo de Esperanto?

A.- Ne!

Cl.- Ĉu neee?! Aŭskultu! La interna ideo de Esperanto estas: **ami unu la alian**. Ĉu vi komprenis?

A.- (tre mallaŭte): Jees !

Cl.- Ankoraŭ unu demandon ! Ĉu vi amas min?

A.- (apenaŭ aŭdeble): Jeees !

Cl.- Kio estas do la interna ideo de Esperanto?

A.- Ĉarmulino (kun revantaj okuloj): Ami vin.

Cl.- Mihok: Tre bone! Nur ne forgesu tion! Ĝis revido!

A.- Ĥoro de la Gelernantoj: Ĝis!

Cl.- Tiu priskribo de Julio BAGHY pri la kursgvidanto kaj metodologo Mihok instigu nin relegi liajn karikaturajn de esperantistoj. Ho, ne ĉiuj ŝatas ilin, kvankam pluraj el ili restis tre aktualaj. Pro tio verŝajne oni ne ofte citas ilin dum esperanto-kunvenoj.

A.- La venontajn decembrajn elsendojn ni plue laŭtleĝos al vi aliajn prozajn fragmentojn el la posedinda duvoluma verko **TREZORO** aŭ **ESPERANTA NOVELARTO**, en kiu Reto ROSSETTI kaj Henri VATRÉ proponas al ni specimenajn rakontojn de cent esperanto-verkistoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras al vi, ĝis reaŭdo!